nia voĉo

madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2026

## SOMERO, TEMPO DE RENKONTOJ

Alvenis somero, kaj do niaj ĉefaj novaĵoj koncernas la renkontojn antaŭvidatajn por la du venontaj monatoj, ĉefe la kongresojn programitajn en julio kaj aŭgusto en Hispanio. Kelkaj ricevis surprize malmultajn aliĝojn el Madrida regiono, do ni vere instigas vin pripensi vian partoprenon kaj la ŝancon renkontiĝi kun esperantistoj el aliaj mondopartoj.

Unue, memoru ke inter la 14a kaj la 18a de julio okazos la **84-a Hispana Esperanto-Kongreso** en Portugalete, Biskajo, tre proksime al Bilbao. En la retejo kongreso.esperanto.es eblas trovi ĉiujn detalojn, inkluzive de la preskaŭ definitiva programo kaj planitaj ekskursoj kaj ankaŭ oni tie povas aliri la aliĝilon kaj la liston de registritaj partoprenantoj.

Tuj poste, inter la 19a kaj la 26a de julio, okazos la **Kongreso de la Sennacieca Asocio Tutmonda** (SAT) en Leono. Vi povas legi la ĉefajn informojn en la retadreso: https://sat2026leono.org/, inklude de la programo, kiu havos kiel bazan temon "Paco kaj militoj. Datreveno de la Hispana Enlanda Milito".

En aŭgusto, inter la 9a kaj la 16a, okazos la **Internacia Junulara Kongreso** (IJK), en Tiana, tre proksime de Barcelono. Vizitu la retejon ijk2026.tejo.org por legi ĉiujn informojn kaj registriĝi per la aliĝilo. Ĝi konsistos ĉefe el programo por gejunuloj, sed ankaŭ inkludos eventon por ne tiom junaj "Rejuniĝu" (https://eventaservo.org/e/8661d1). Kaj kun suneklipso!

Fine memoru ke la **111-a Universala Kongreso de Esperanto** okazos en Graco (Graz, Aŭstrio) de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 2026. Legu la detalojn kaj aliĝu ĉe: https://uk.esperanto.net.

## VENONTAJ RENKONTIĜOJ EN MADRIDO

La venonta unuasabata renkontiĝo okazos la 4an de julio, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Oni ankoraŭ ne programis renkonton en aŭgusto, do estu atentaj al la kutimaj forumoj por scii pri aliaj planoj, kaj ankaŭ kaze ke oni programu specialajn renkontojn okaze de alveno de ekstermadridaj amikoj aŭ aliaj eventoj.

La sidejo plu malfermiĝos lunde, post la 18,30, kiel tradicie, sed eble ne ĉiujn, pro la someraj ferioj. Bv konfirmi ĉeeston antaŭ ol alveni, ĉefe en aŭgusto.

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia reto *Bluesky* vi povas trovi nin ĉe: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

## FELIĈAN SOMERON AL ĈIUJ!

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com